

KATRINA MALFRUAS

Facila rakonto



Sten Johansson

Katrina malfruas

Tria rakonto pri Katrina

Facila rakonto kun klarigoj de la malfacilaj vortoj kun aldonoj en
la angla kaj korea lingvoj

Originale verkis Sten JOHANSSON

Glosis en la angla gvo la aŭtoro

kaj Edmund GRIMLEY EVANS Glosis en la
korea lingvo L E E J u n g k e e

Unua eldono: Al-fab-et-o, Skövde, Svedio, 2001

Tria eldono: Seula Esperanto-Kulturcentro

Ĉiuj rajtoj estas rezervitaj ĉe la aŭtoro kaj la eldonisto

Distribuas: Seula Esperanto-Kulturcentro

#601 Myungdong Doms, 305, Samil-daero, Jung-gu, Seulo, 04537,

Koreio (010-3340-5936)

Retpoŝto: leejungkee@khu.ac.kr

Presita en Seulo, Koreio

Sten Johansson

KATRINA MALFRUAS

Facila rakonto

Tria eldono

Seula Esperanto-Kulturcentro

Enhavo:	Paĝo
1. Telefono sonas	3
2. Televidi kaj dormi	5
3. Katrina malfruas	7
4. Sola	9
5. Katrina enuas	11
6. Finfine somero!	13
7. Kanti ĉe la maro	16
8. La gvidisto	18
9. Druidoj aŭskultas	21
10. Tio, kio estas	23
11. La ĉefo	25
12. Katrina foriras	28
13. En Parizo	30
14. Post la somero	32
15. Katrina atendas	34
16. Problemoj pri patroj	36
17. Unu el	39
18. Vizito en Stokholmo	42
19. Neniuj respondoj	45
20. Katrina fruas kaj malfruas	48
Teknika postklarigo por instruantoj	51

1. Telefono sonas

Estas sabato. Ne estas nokto, tamen ne estas tago. Estas la horo inter nokto kaj tago. Katrina dormas. Sabato estas libera tago. Sabate ŝi ne laboras. Ŝi kuŝas en la lito. Ŝi dormas post kvin labor-tagoj.

Estas silente kaj trankvile en la domo de Katrina. Ŝi loĝas en domego. Multaj homoj loĝas tie. Ofte ĝi ne estas tre silenta domo. Sed nun ĝi estas silenta. Ĉiuj dormas. Ĉiuj silentas.

En la dormo Katrina ridetas, sed dormas plu. Ŝi kuŝas en granda lito. La lito estas tro granda por unu homo. Sed Katrina estas sola. Neniu loĝas kun ŝi. Neniu dormas kun ŝi.

Subite sonas telefono. Melodio sonas. Melodio de poŝtelefono. Tiu melodio plaĉas al Katrina. Ĝi estas ŝia propra melodio. Tage ĝi plaĉas. Nokte ne. Ŝi saltas en la lito. Nun ŝi sidas surlite kaj serĉas. Kie estas la telefono? Ŝi serĉas sur la lito-tablo. Ne, tie ĝi ne estas. La melodio refoje sonas. Ĝi venas el la pantalono! La pantalono de Katrina kuŝas sur seĝo. Ŝi serĉas en la poŝoj de la pantalono. Poŝtelefono devas kuŝi en poŝo, ĉu ne? Jes! Jen la telefono! Kaj jen refoje la melodio. Ŝi respondas:

“Jen Katrina!”

En ŝia telefono sonas voĉo. Fremda voĉo. Virino parolas. Ŝi telefonas de malsanulejo. Ŝi estas flegistino. La patrino de Katrina estas tre malsana. Estas krizo. La malsano nun estas tre grava. Katrina devas veni al la malsanulejo. Ŝi devas veni rapide.

Post mallonge Katrina sidas en malgranda aŭto. Ŝi iras al la urbo de la patrino. En la mano de Katrina estas botelo. En ĝi estas lakto. Jen la matenmanĝo de Katrina! Ŝi trinkas. Sur la vojo ne estas multaj aŭtoj. Estas frua sabata mateno. Multaj homoj estas

liberaj. Ili ne laboras. Ili dormas en la litoj. Ankaŭ Katrina ne laboras. Tamen ŝi ne estas libera. Ŝi ne dormas, sed rapide iras per aŭto. Ŝi aŭtas al alia urbo.

Ne plu estas nokto. La tago alvenas, sed por Katrina ne estas tago. Ŝi volas trinki refoje el la botelo, sed ne plu restas lakto. La botelo estas malplena. Ŝi ne plu povas matenmanĝi.

Glosoj: / esperante / *angle* / koree

(Literoj ^{A-F} montras oftecon de la radiko; ^A = plej ofta, ^F = plej malofta.)

aŭti ^Biri per aŭto / *go by car* / 차를 몰다

botelo ^Cvitra ujo kun malvasta kolo / *bottle* / (유리)병

flegi ^Ĉprizorgi malsanulon / *nurse* / 간호하다

fremda ^Cnekonata, de alia loko, nepropa / *strange, foreign* /
낯선

krizo ^Ddanĝera tempo aŭ momento, malboniĝo / *crisis* /
위기

lakto ^Ĉtrinkaĵo el mammo de bovino aŭ alia besto / *milk* /
우유

mal-plena ^Atia, ke estas nenio en ĝi / *empty* / 텅 빈

mal-san-ul-ejo ^Bdomo por sanigi malsanulojn / *hospital* / 병원

melodio ^Esinsekvo de muzikaj sonoj / *tune, melody* / 멜로디

poŝ-telefono ^{CB}libere portebla telefoneto / *mobile phone* / 휴대전화

re-foje ^Adenove, duan fojon / *again* / 다시한번

sabato ^Ĉsesa tago de la semajno, inter vendredo kaj dimanĉo
/ *Saturday* / 토요일

silenti ^Besti silenta, agi silente / *be silent* / 침묵하다

sur-lite ^Bsur lito / *on the bed* / 침대 위에서

2. Televidi kaj dormi

En la aŭto Katrina pensas pri hieraŭ. Hieraŭ estis vendredo. Dum la tuta tago Katrina laboris. Ŝi estas instruisto. Ŝi instruas legi. La infanoj de ŝia klaso estas dek-jaraj. Ili delonge scias legi. Kelkaj legas bonege kaj multe. Sed aliaj ne ŝatas legi. Kaj du knaboj legas tre malbone. Hieraŭ Katrina diris al Jens:

“Jen via hejm-laboro. Ĝi estas facila rakonto.”

Sed li kontraŭdiris:

“Ĝi estas tro longa! Kaj malfacila! Estas tro multaj vortoj! Kaj tro longaj vortoj! Mi ne volas legi tiel multe!”

“Ĝi tute ne estas malfacila, Jens”, diris Katrina. “Vi scias legi. Ĝi estas facila kaj bona rakonteto. Vi devas legi malrapide por bone kompreni.”

Katrina instruas ankaŭ pri geografio kaj historio, naturo kaj muziko. Ankaŭ la angla lingvo gravas. Sed plej grava estas la sveda lingvo. Ŝi instruas en sveda lernejo. Katrina loĝas en Gotenburgo, kaj ŝi ankaŭ laboras tie. Gotenburgo estas urbo en Svedio.

Post la laboro Katrina ĉiam estas laca, kaj vendrede ŝi estis lacega. Ŝia hejmo estas eta loĝejo en domego. Post la laboro hieraŭ ŝi iris al la loĝejo. Hejme ŝi ripozis. Vespere ŝi volis paroli kunamikinoj, eble iri al trinkejo. Sed ŝi estis tro laca. Ŝi nur sidis hejme, sola. Ŝi manĝetis kaj televidis. Poste ŝi dormis. Unue ŝi dormetis sur la sofo, antaŭ la televidilo. Kaj poste ŝi dormegis en la lito. Ŝi dormis dum kelkaj horoj. Poste sonis la telefono.

Glosoj:

angla ^Ĉ.....la lingvo de Usono kaj aliaj landoj; el ĉefa parto de Britio / *English* / 영 어 의

de-longe ^A.....de antaŭ longa tempo / *for a long time (till now)* / 오래전부터

geografio ^D.....scioj pri la tero, landoj, lokoj / *geography* / 지리

Gotenburgo ^FLa dua urbo de Svedio (*Göteborg*) / *Gothenburg* / 고텐부르크

hieraŭ ^Ben la antaŭa tago / *yesterday* / 어제

historio ^Btio, kio okazis / *history* / 역 사

kontraŭ-diri ^Adiri ion kontraŭ tio, kion diris alia homo / *contradict* / 반론하다

laca ^Csen-fora, ripozema / *tired* / 피 곤 한

muziko ^Ĉplaĉa kombino de sonoj / *music* / 음악

sofo ^Dkomforta meblo, kie pli ol unu homo povas sidi / *sofa* / 소파

svedo ^Ĉano de nordeŭropa nacio / *Swede* / 스웨덴인

tele-vidi ^Dvidi programon per malproksima elektromagneta dissendado / *watch TV* / 텔레비전을 시청하다

vendredo ^Ĉkvina tago de la semajno, inter ĵaŭdo kaj sabato / *Friday* / 금요일

3. Katrina malfruas

Katrina iras plu per la aŭto. Ŝi jam longe scias, ke ŝia patrino estas malsana. Ŝi jam estis en la malsanulejo, en alia urbo. Estas grava malsano. Sed ŝi ne pensis, ke ĝuste nun estos krizo. Ŝi pensis, ke la malsano estos malrapida. La patrino de Katrina ne estas maljuna. Ŝi malsanas, sed ŝi estas tro juna por grava malsano. Ŝi devas vivi longe plu. La malsano venis tro frue.

Katrina venas al la urbo de la patrino kaj iras al la malsanulejo. Tie estas kelkaj grandaj domoj. Ŝi scias, kiu estas la ĝusta domo. Ŝi jam pli frue estis tie. La patrino kuŝas en kliniko. Ŝia malsano estas grava. Katrina jam komprenis, ke venos krizo. Sed ŝi ne komprenis, ke ĝi venos nun. Ĝi venas subite. La krizo de la patrino estas tro subita.

Katrina iras al la kliniko. Tie estas flegistino. Ŝi sidas ĉe tablo. Kiam Katrina venas, la flegistino ekstaras. Ŝiaj okuloj estas maltrankvilaj. Tro maltrankvilaj. Tiuj okuloj ne plaĉas al Katrina. Io ne estas bona pri la okuloj de la flegistino. Nun ankaŭ Katrina maltrankvilas.

Katrina rapidas. Ŝi volas rapide iri al la ĉambro de la patrino. Sed la flegistino diras al ŝi:

“Bonvolu sidi.”

Ŝi montras al seĝo.

Tiam Katrina komprenas. Ŝi malfruas.

“Ĉu mi venas tro malfrue?” ŝi demandas.

La flegistino diras:

“Via patrino ne tre suferis. Okazis rapide kaj facile.”

“Kie ŝi estas?”

“Mi montros al vi.”

La flegistino kaj Katrina malrapide iras al ĉambro. *Ŝi ne suferis*, pensas Katrina. Ankaŭ Katrina ne suferas. *Ŝi estas malplena*. En ŝi estas neniue sento. Neniu sufero. *Ŝi iras kun la flegistino*, tamen sola. Katrina estas sola. *Ŝi rapidis al la malsana patrino*, sed nun ŝi ne rapidas. La patrino ne plu malsanas. La patrino de Katrina ne plu estas. *Ŝi ne plu vivas*. Katrina jam estas tute sola.

Glosoj:

kliniko ^D..... flegejo, parto de malsanulejo / *clinic* /

진료실

mal-frui ^Besti malfrua, veni malfrue / *be late* / 늦다

mal-sani ^Besti malsana, suferi de malsano / *be ill* /

병들다

mal-trankvili ^Besti maltrankvila, agi maltrankvile / *be worried* /

불안하다

suferi ^Csenti aŭ sperti gravan malbonon, doloron / *suffer* /

고통을 느끼다

4. Sola

Katrina plu laboras. Ŝi estas instruisto, kaj ĉiutage ŝi devas esti trankvila kaj pacienca. Ŝi estas laca, sed ŝi devas ne esti tro laca. Ŝi devas zorgi pri preskaŭ ĉio. Ofte la infanoj ne volas lerni. Kelkfoje ili batalas. Preskaŭ ĉiam ili parolas tro multe. Kelkfoje iu infano malĝojas. Iufoje Katrina pensas, ke iu infano havas gravan problemon. Sed plej ofte ŝi ne povas helpi. Ne facilas helpi.

Katrina volas demandi la patrinon, kia ŝi mem estis kiel infano. Ĉu ankaŭ Katrina estis maltrankvila kaj parolema? Ĉu ŝi ofte malĝojis? Sed ŝi ne povas demandi pri tio. Tio ne plu eblas. Ŝi ne plu havas patrinon. Nun Katrina ofte malĝojas. Ĉu ankaŭ kiel infano ŝi malĝojis? Ŝi ne scias.

Ŝi ankaŭ ne povas demandi la patron. Katrina ne konas lin. Kiu estas ŝia patro? Katrina ne scias. Ŝi volis demandi la patrinon, kiu li estas. Sed nun tio ne eblas.

La patrino iam rakontis, ke la patro de Katrina estis instruisto en lernejo. Ŝi studis muzikon tie. Li estis muzikisto kaj tre bone instruis ŝin. Eble li instruis ŝin ne nur pri muziko, pensas Katrina. Eble ankaŭ pri amo? Tamen, poste ŝi foriris de la lernejo kaj ekhavis filinon, Katrinan. Ĉu la patro de Katrina scias, ke li havas filinon? Katrina pensas, ke jes. Tamen li neniam renkontis ŝin. Kaj Katrina ne scias, kiu estas ŝia patro. La patrino ne volis rakonti tion. Kaj nun estas tro malfrue. Ŝi ne plu povas demandi, kiu li estas. Katrina malfruas.

Katrina nun estas tre sola. Ŝi ne havas propran familion. Kaj nun ŝi malhavas ankaŭ la patrinon. Tamen la patrino estis tre juna. Katrina jam devas zorgi pri la propra vivo. Kaj ŝi devas fari tion sola. Sed ĝuste nun ŝia forto sufiĉas nur por la laboro. Ŝi ne havas

familion, sed ŝi havas la infanojn de la lernejo. Pro la laboro ŝi ne havas tempon multe pensi pri la patrino. Eble tio estas bona, eble malbona. La infanoj kaj la instruado tamen helpas ŝin vivi plu.

Glosoj:

ĉiu-tage ^Aen ĉiu tago / *every day* / 매일

pacienco ^Ĉtrankvila atendo / *patience* / 인내

problemo ^Cmalfacila afero / *problem* / 문제

5. Katrina enuas

Refoje estas sabato. Katrina enuas en trinkejo. Sed hodiaŭ ŝi ne estas sola. Ŝia amiko Pernilla telefonis al ŝi kaj invitis ŝin rigardi hokeon. Hokeo ne tre interesas Katrinan kaj Pernillan. Sed Mats, la edzo de Pernilla, tre ŝatas hokeon.

“Ne estas amuze iri nur kun Mats”, diris Pernilla telefone. “Sed se vi venos, estos bone. Ni povos interparoli kaj moki la virojn. Ankaŭ Peter, la amiko de Mats, venos. Poste ni trinkos glason da io. Venu, Katrina! Vi devas fari ion amuzan!”

Katrina unue pensis, ke ne estas granda amuzo rigardi hokeon kaj trinki bieron kun mil viroj, kiuj krias. Tamen plaĉas al ŝi renkonti Pernillan. Kaj ŝi jam ege enuas televidi. Do, ŝi jesis.

Komence la hokea ludo estis bona. Ludis gotenburganoj kontraŭ stokholmanoj. Hokeo estas tre rapida ludo. Ĉiam io okazas. Oni ne enuas. Sed proksime al la fino, la hokeistoj ne plu volis ludi. Ili komencis batali. Tio tre plaĉis al Peter kaj Mats. Katrina sidis inter ili, kaj ŝi ne ŝatis tion.

“Sufiĉas al mi la bataloj de knabetoj en mia lernejo”, ŝi diris. Sed neniŭ aŭdis ŝin. Ĉiuj kriis tro multe.

Post tiom da kriadado oni vere bezonas bieron. Katrina ne kriis, tamen la biero plaĉas al ŝi. Sed en la bierejo kelkaj homoj plu kriadas. Pro tio ŝi nun enuas. “Kial ili tiom krias?”, ŝi diras. “Mi volas nur trankvilon.” Nun Peter aŭdas ŝin. Li bonege komprenas ŝin. Li volas iri kun ŝi al ŝia loĝejo. Aŭ ĉu ili iros al lia loĝejo? Ne gravas. Estos trankvile. Nur ŝi kaj li. Neniŭ kriadado. Bone, ĉu ne?

Ĉu jes? Katrina ne scias, ĉu li plaĉas al ŝi. Ŝi scias nenion pri li. Jes, ŝi scias, ke li ŝatas hokeon kaj bieron. Eble li ŝatas ankaŭ ŝin. Li estas amiko de ŝiaj geamikoj. Eble ili invitis lin ĝuste pro ŝi.

Eble li revas pri vespero sola kun ŝi. Sed kion ŝatas ŝi? Kio plaĉas al ŝi? Pri kio revas ŝi?

Ĝuste nun ŝi revas pri la lito. La propra hejma lito, kiu estas tro granda por unu homo. Ŝi revas pri iu alia homo en ĝi. Iu, kiun ŝi povus ami. Sed kiu? Ĉu Peter? Ne, tute ne. Ŝi ne revas pri li.

Ŝi eltrinkas la bieron kaj ekstaras.

Peter rigardas ŝin kaj diras:

“Atendu iomete. Mi venos kun vi.”

“Dankon, sed mi iros sola”, ŝi diras al li. “Tio ne estas problemo. Mi kutimas iri sola.”

Kaj ŝi foriras de la amikino kaj amikoj.

Glosoj:

biero ^Ĉ.....malforta alkoholaĵo el greno / *beer* / 맥주

enui ^D.....havi malbonan senton, ĉar nenio okazas / *be bored* /
지루하다

hodiaŭ ^B.....en la nuna tago / *today* / 오늘

hokeo ^E.....sporto de teamoj sur glacio aŭ herboj / *hockey* /
하키

inviti ^Ĉ.....proponi al iu veni ien aŭ fari ion / *invite* / 초대하다

moki ^Ĉ.....diri ion ridigan pri iu / *mock* / 조롱하다

revi ^Ĉ.....imagi ion, kion oni deziras / *(day)dream* / 꿈꾸다,
공상하다

Stokholmo ^E.....La ĉefurbo de Svedio (*Stockholm*) / 스톡홀름

6. Finfine somero!

Finfine estas somero! Kaj finfine Katrina havas libertempon. Ŝi sentas, ke ŝi ne povus labori unu plian tagon. Nun ŝi faros ĉion, kion ŝi ne povis fari pli frue. Unue ŝi ripozos. Poste ŝi renkontos la amikinojn. Ŝi amuziĝos. Ŝi vivos!

Dum unu semajno ŝi ripozas, promenas sur strando, trinkas vinon, ĝuas la libertempon. Poste ŝi jam iomete enuas. Ŝi telefonas al Pernilla. Sed la amikino kaj ŝia edzo havas libertempon kaj foriros al liaj gepatroj. Alia amikino laboros kaj tute ne havas tempon amuziĝi. Tria amikino ne respondas telefone. Kaj tiel plu. La lasta amikino respondas poŝtelefone kaj rakontas, ke ŝi ĝuste nun kuŝas sur strando en Turkio.

Se ĉio estus kiel iam, Katrina povus iri al la patrino en alia urbo. Ŝi povus ripozi tie. Ŝia patrino zorgus pri ŝi, same kiel antaŭ longa tempo, kiam ŝi estis infano.

Sed tio ne eblas. Neniam plu tio eblos.

Tiam alvenas letero de Aline. Aline estas francino. Katrina renkontis ŝin antaŭ kelkaj jaroj. Ŝi skribas, ke ŝi iros al Esperanto-kunestado en Bretonio. Kaj ŝi proponas al Katrina veni tien.

Katrina pripensas. Ŝi ne planis vojaĝi alilanden. Sed kial ne? Estus bone refoje renkonti la francan amikinon. Kaj eble ŝi trovos novajn amikojn. Iam ŝi renkontis tre karan amikon en Esperanta kunestado. Ĉu tio eblos duafoje? Eble la propono de Aline estas bona.

La letero bezonis dek tagojn por veni al Katrina en Gotenburgo. Katrina jam malfruas por plani la vojaĝon. Sed eble ŝi ne devas plani. Kial ne simple ekiri?

En la sekva mateno Katrina sidas sur ripozo-seĝo en ŝipo, kiu iras de Svedio al Danio. La suno brilas super trankvila maro. Katrina libertempas! Ŝi ĝuas botelon da dana biero sen krioj, sen hokeo kaj sen batalo. En Danio ŝi ekiras per rapida vagonaro suden. Vespere ŝi jam suriras noktan vagonaron de Hamburgo al Parizo. Matene ŝi trinkas kafon kun lakto en eta Pariza kafejo. Estas la deka horo. Hieraŭ matene ŝi estis hejme. Kial ŝi subite estas en fremda urbego, en fremda lando? Kiel okazis tio? Ŝi estas lacega, ĉar en la vagono ŝi ne povis dormi. Sed tio estas tute alia laceco ol la kutima. Ŝi preskaŭ ĝuas ĉi tiun lacecon. Ŝi decidas resti dum unu tago en Parizo por ripozi. Poste ŝi iros plu al Bretonio.

Glosoj:

ali-land-en ^A.....al alia(j) lando(j) / *abroad* / 다른 나라로

BretonioRegiono en nord-okcidenta Francio / *Brittany* /
브레토니아 지역

bretono ^Eano de popolo en nordokcidenta Francio / *Breton* /
브레토니아 인

dano ^Eano de nordeŭropa nacio inter Svedio kaj Germanio /
Dane / 덴마크 인

dua-foje ^Adenove, jam la duan fojon / *a second time* / 두 번 째

fin-fine ^Aplej fine, post longa atendado / *at long last* / 마침내

franco ^Ĉano de popolo en okcidenta Eŭropo / *Frenchman* /
프랑스인

ĝui ^Ĉsenti grandan plezuron de io / *enjoy* / 즐기다

Hamburgo ^Eurbo en norda Germanio (*Hamburg*) / 함부르크

kun-est-ado ^Akiam oni estas kun aliaj homoj / *being together* /
합숙, 회합

liber-tempo ^{BA}tempo, kiam ne necesas labori / *holidays* / 휴가

7. Kanti ĉe la maro

Katrina malfruas. Per vagonaro ŝi vojaĝis de Parizo al urbeto ĉe la marbordo de Bretonio. Post iom da serĉado ŝi trovas la kunvenejon. La Esperanto-kunestado komenciĝis jam hieraŭ. Kiam ŝi alvenas, oni surpriziĝas, ĉar ŝi ne aliĝis antaŭe. Tamen ne gravas. Ŝi pagas pro la aliĝo, trovas liton en komuna dormejo kaj komencas serĉi la amikinon Aline. Ŝi ĝojas, ke ŝi renkontos ŝin. Aline estas tre simpatia virino. Ili renkontiĝis en kurso antaŭ kelkaj jaroj.

Katrina trovas multajn francinojn, sed neniun Aline. Kaj neniu konas ŝin. Fine Katrina demandas la sinjoron, kiu zorgis pri ŝia aliĝo. Li serĉas en kelkaj paperoj kaj trovas la nomon de Aline.

“Ŝi tamen ne alvenis”, li diras. “Eble ankaŭ ŝi malfruas.”

Katrina devas komenci la kunestadon sen Aline. Oni proponas lingvo-kursojn de Esperanto kaj la Bretona lingvo, prelegojn pri franca naturo, kelta historio kaj Esperanta teatro, grupojn de promonado kaj kantado. Katrina unue aŭskultas prelegon pri kelta historio kaj poste aliĝas al la grupo de kantado. Ŝi tre ŝatas kanti.

En la sekva tago la kanto-grupanoj ekskursas al bela strando inter rokoj. Tie ili kantas, dum la maro onde akompanas ilian kantadon. Ili staras surstrande, kun la piedoj en la akvo. La ondoj malrapide lekas iliajn piedojn, dum ili kantas. Katrina sentas, ke ŝia laceco foriras. La maro forlekas ŝian malĝojon kaj solecon. La komuna kantado donas al ŝi senton de kuneco. Katrina ne plu estas sola. Ŝi estas unu el aro da grupanoj.

La sekvaj tagoj pleniĝas de kantado kaj interparoloj kun homoj el malsamaj landoj. Katrina konas neniun de antaŭe, sed nun ŝi ekkonas kelkajn el ili. Fine de la kunestado ŝi trovas okazon

telefoni al Aline. Ŝi ekscias, ke la amikino ne povis veni al Bretonio, ĉar ŝi devis flegi sian maljunan patron. Ili tamen decidis iam renkontiĝi refoje. Eble en la sekva jaro?

Glosoj:

akompani Ĉ	kunesti, kuniri, kunludi / <i>accompany</i> /
	동반하다
al-iĝi ^A	anonci sin kiel ano, partoprenanto / <i>join</i> / 참가하다,
	가입하다
ekskurso Ĉ	mallonga vojaĝo pro plezuro / <i>excursion</i> / 소풍, 관광
for-leki ^D	forigi per tuŝo de la lango / <i>lick off</i> /
	혀로 핥다
kelto ^E	ano de popolo, kiu iam vivis en centra kaj okcidenta
	Eŭropo / <i>Celt</i> / 켈트인
kun-eco ^A	sento, ke oni estas kun io aŭ iuj / <i>togetherness</i> /
	동료의식
kurso Ĉ	grupo, kiu lernas kune / <i>course</i> / 강습
leki ^D	tuŝi per la lango / <i>lick</i> / 혀로 핥아 없애다
rapida altiĝo-malaltiĝo de akvo	/ <i>wave</i> / 파도
ond-e Ĉ	en ondoj, per ondoj / <i>in waves</i> / 파도 속에서
prelego ^D	instrua parolado / <i>lecture</i> / 강연
roko ^D	ŝtonego / <i>rock</i> / 바위
simpatia Ĉ	plaĉa, vekanta favoran inklinon / <i>nice, likable</i> /
	호감(동감)이 가는
surprizi Ĉ	mirigi per io neatendita / <i>surprise</i> / 놀라게 하다
sur-strande ^E	sur strando / <i>on the beach</i> / 해변에서

8. La gvidisto

La Esperanto-kunestado finiĝis. Katrina ĝuis la tagojn en apudmara Bretonia urbeto. Sed ŝi bedaŭras, ke Aline ne povis veni tien. Kaj Katrina ne vere trovis novajn amikojn. Kelkaj el la kanto-grupanoj estis tre simpatiaj, sed ili ne iĝis veraj amikoj. Preskaŭ ĉiuj aliaj estis pli maljunaj ol ŝi. Kelkaj estis geedzoj. Tamen tio ne tre gravas. Ŝi bonege ripozis kaj ĝuis la kantadon ĉe la maro.

Nun ŝi luas etan aŭton por vidi pli multe de Bretonio. En la prelego ŝi aŭdis pri memoraĵoj el kelta historio. Ŝi iras al loko, kie staras ŝtonegoj el la pratempo.

La memoraĵo estas tre granda kaj interesa. Gvidisto rakontas pri la kelta historio. Se ŝi atendos duonhoron, li rakontos ankaŭ en la angla lingvo. Katrina unue aŭskultas lian francan gvidadon. Ŝi ŝatas la sonon de la franca lingvo, sed ŝi nenion komprenas. La voĉo de la gvidisto estas tre energia.

Poste li rakontas angle al ŝi kaj du anglaj geedzoj. Tiam lia voĉo estas multe pli mola. *Strange*, pensas Katrina. *Ĉu la lingvo povas tute ŝanĝi la voĉon?* Ŝi preskaŭ forgesas aŭskulti la vortojn. Ŝi tiel ĝuas la sonon de lia voĉo.

Troviĝas tie ankaŭ eta muzeo kun pratempaj trovaĵoj. Ankaŭ tie rakontas la gvidisto. Li estas juna, eble dudekkvin-jara, same kiel Katrina. La angloj foriras, sed li plu rakontas nur al ŝi. La kelta historio estas tre granda temo. Eblas longe paroli pri ĝi.

Poste estas tempo fermi la muzeon.

“Ĉu vi eble ŝatus vespermanĝi kun mi?” demandas la gvidisto.

Subite Katrina sentas, ke ŝi tre malsatas.

“Sed... ĉu estas restoracio ĉi tie?” ŝi diras.

“Ne, nur en la urbo”, li respondas kun rideto. “Sed mi pensis ke eble ĉe mi... Mi havas ĉambron ĉi tie, en la muzea domo. Estus tre simple...”

La vespermanĝo vere estas simpla, sed bonega. Fiŝo, mituloj kaj blanka vino. Katrina ege ĝuas ĝin. Kaj tre plaĉas al ŝi interparoli kun la franca gvidisto kun mola angla voĉo. Nun ili ne plu parolas nur pri la kelta historio, sed pri ĉio. Pri la vivo, pri la propra historio, pri la revoj. Katrina rakontas pri la laboro kiel instruisto, pri la morto de ŝia patrino kaj pri la ĝojo, kiam venis la libertempo. La gvidisto parolas pri la Bretonia urbo Kemper, kie li vivas kaj laboras dumvintre. Dume la suno subiras trans la keltaj ŝtonegoj. En Bretonio la suno subiras malfrue. Subite estas noktomezo. Tiam Katrina memoras, ke ŝi ne scias, kie ŝi dormos.

Glosoj:

angl-e ^Ĉ	en la angla lingvo / <i>in English</i> / 영어로
apud-mara ^B	proksima al la maro / <i>by the sea</i> / 해변의
bedaŭri ^C	pensi, ke estas malbone, ke io okazis / <i>regret</i> / 아쉬워하다, 유감스러워하다
dum-vintre ^Ĉ	dum vintro / <i>in the winter</i> / 겨울 동안에
energio ^Ĉ	kapablo fari laboron; fonto de forto / <i>energy</i> / 에너지
gvidi ^Ĉ	montri al iu, kien iri aŭ kion fari / <i>guide</i> / 안내 (지도)하다
lui ^Ĉ	pagi por uzi dum difinita tempo / <i>hire, rent</i> / 임차하다, 빌리다
mal-sati ^B	senti bezonon manĝi / <i>be hungry</i> / 배고프다
mitulo ^E	manĝebla mara molusko kun blua konko (<i>Mytilus</i>) / <i>mussel</i> / 홍합

mola ^Ĉ	ne rezista al premo / <i>soft</i> / 부드러운
muzeo ^Ĉ	ejo, kie oni publike montras kolektojn / <i>museum</i> / 박물관
pra- ^D	tre malnova / <i>ancient, pre-, proto-</i> / (시간적으로) 먼
pra-tempo ^A	tempo antaŭ tre multaj jaroj / <i>antiquity</i> / 원시시대
restoracio ^D	ejo, kie oni manĝas kontraŭ pago / <i>restaurant</i> / 레스토랑
sata ^B	kiu ne bezonas manĝi / <i>full, satiated</i> / 배부른
sub-iri ^A	iri suben aŭ malsupren de io / <i>go down</i> / 내려가다
trov-aĵo ^A	io, kion oni trovis / <i>find (something found)</i> / 발견물
trov-iĝi ^A	esti trovebla en iu loko / <i>be found, exist</i> / 발견되다, 존재하다
vintro ^Ĉ	mal-somero / <i>winter</i> / 겨울

9. Druidoj aŭskultas

Estas mateno. Katrina vekigas en lito. Ŝi kuŝas en malgranda lito. La lito estas tro malgranda por du homoj. Katrina ne estas sola. Apud ŝi kuŝas Eddie, la gvidisto. La malgranda lito estas la lito de Eddie.

Ŝi rigardas lin. Li dormas. Ŝi ne kutimas rigardi virojn, kiuj dormas. Ne tiel proksime. Sed li ne malplaĉas al ŝi. Male, li tre plaĉas al ŝi. Ŝi ŝatas la keltan gvidiston. Eble... eble ŝi... amas lin?

La antaŭa vespero estis tre bona. Ili multe interparolis. Ili manĝis kaj trinkis vinon. Tamen ne tro multe. Fine Eddie proponis al ŝi la liton. Ŝi akceptis. Li diris, ke li povas dormi surplanke. Sed ŝi pensis, ke la planko estas tro malmola dormejo. Ŝi demandis, ĉu ankaŭ li volas kuŝi en la lito. Li akceptis.

Post la matenmanĝo Eddie devas labori. Venas kelkaj vizitantoj, kaj li devas gvidi ilin inter la ŝtonegoj kaj rakonti pri la loko kaj pri la kelta historio. Li rakontas france kaj angle. Li rakontas pri multesciaj druidoj kaj pri sentimaj batalantoj. Li diras, ke la iamaj druidoj eble ĉeestas ankaŭ hodiaŭ, ĉar ĉi tio estas magia loko. Katrina kuniras kaj aŭskultas. Ŝi aŭskultas la energie francan kaj mole anglan voĉon de Eddie. Post kelka tempo ŝi konas lian rakonton. Se venus svedoj ŝi povus gvidi ilin svede. Aŭ Esperante. Sed neniuj vizitanto petas svedan aŭ Esperantan gvidadon.

Posttagmeze Katrina aŭtas al la apuda urbo. Ŝi aĉetas manĝaĵojn kaj vinon. Vespere ŝi kuiras manĝon en la ĉambro de Eddie. Kaj refoje ili kune manĝas, trinkas kaj interparolas. Katrina estas feliĉa. Ŝi ne plu solas. Ŝi volis renkonti novan amikon. Ŝi revis pri alia homo, kiun ŝi povus ami. Iu, kiu povus ami ŝin. Kaj

nun ŝi trovis tiun amikon, tiun homon, tiun amanton. Refoje li proponas al ŝi la liton. Kaj refoje ŝi demandas, ĉu ankaŭ li volas kuŝi en ĝi. La lito estas malgranda, tamen ne tro malgranda. Ĝi estas malnova kaj faras malbelan sonon, kiam ili moviĝas en ĝi. Sed tio ne gravas. Nur la druido aŭskultas la du geamantojn.

Glosoj:

am-anto ^Bhomo, kiu amas / *lover* / 연인

druido ^Eiama kelta pastro kaj kuracisto / *druid*

<신화> 드루이드 성직자

ge-am-antoj ^Bviro kaj virino, kiuj amas / *lovers* / 남녀연인

magio ^Eagoj per supernaturaj fortoj / *magic* / 마술

multe-scia ^{AA}tia, ke oni scias multon / *learned, knowledgeable* /

해박한, 박식한, 지식이 많은

sen-tima ^Atia, ke oni ne timas / *fearless* / 두려움이 없는

sved-e.....en la sveda lingvo / *in Swedish* / 스웨덴어로

soli ^Besti sola, senti solecon / *be alone, be lonely* /

혼자이다

sur-planke ^Csur planko / *on the floor* / 바닥 위에

vizit-anto ^Bhomo, kiu vizitas / *visitor* / 방문자

10. Tio, kio estas

Sabate Eddie iras al sia hejma urbo por viziti siajn gepatrojn. Tiam Katrina faras ekskurson al la marbordo. Ŝi promenas ĉe la bordo kaj rigardas homojn, kiuj serĉas mitulojn. Estas malalta akvo. La maro foriris de la bordo. Nokte ĝi revenos. Ŝi trinkas kafon kaj lekas glaciaĵon. Ŝi atendas la dimanĉon kaj pensas pri Eddie. Dimanĉe li revenos.

Poste, de dimanĉo ĝis vendredo, ŝi restas ĉe Eddie. Dum la tuta semajno ŝi vivas en magia sento de feliĉo. Kompreneble ŝi scias, ke iam ŝia libertempo finiĝos. Iam ŝi devos reveni al Svedio, al Gotenburgo, al la eta loĝejo en la domego kaj al la nelegemaj infanoj en ŝia lernejo. Sed iam ne estas nun. Nun ŝi vivas kun sia kelta gvidisto, kaj ŝi vere ĝuas la nunon. Tre longe ŝi revis, malsatis pri amo, kaj eble same longe ŝi ne satiĝos de amo.

Tage Eddie laboras, sed vespere ili promenas, interparolas, kuiras, manĝas kaj trinkas. Kaj la noktoj estas plenaj de druida magio.

Iuvespere ili kune ekskursas al la maro por bani sin en la varmeta mara akvo. Poste ili longe promenas sur la strando, dum la suno subiras.

Eddie klarigas al Katrina, ke la ŝtonegoj montris la sunleviĝon kaj sunsubiron en la tagoj, kiam okazis gravaj festoj de la keltoj. Per la ŝtonoj la druidoj povis antaŭdiri, kie kaj kiam la suno leviĝos. La ŝtonoj estas druida kalendaro. Katrina ne komprenas lin. Sed tio ne gravas. Ŝi ŝatas aŭskulti, kiam Eddie klarigas pri la kelta magio. Ne gravas, ke la klarigo ne estas tre klara.

Ŝi ŝatus iom paroli ankaŭ pri tio, kio okazos. Kiel estos, kiam ŝi devos reveni al Svedio? Kiam kaj kie ili renkontiĝos refoje? Sed

Eddie ne volas paroli pri tio, kio estos. Lin interesas plej multe tio, kio estis. La historio. Kaj Katrina ne devigas lin pensi pri tio, kio estos. Ŝi ĝuas tion, kio estas. La nunon.

Glosoj:

- antaŭ-diri ^{AA} diri, ke io okazos / *predict* / 예언하다
festo ^C tago, kiam oni ne laboras / *festival, holiday* / 축제
glacio ^Ĉ solida, frostigita akvo / *ice* / 얼음
glaci-aĵo ^Ĉ malvarma dolĉaĵo / *icecream* / 아이스크림
kalendaro ^D sistemo aŭ tabelo pri la jaro, tagoj, monatoj ktp /
calendar / 달력
klar-igi ^B igi pli klara aŭ komprenebla / *explain* / 설명하다
sun-lev-iĝo ^{BB} kiam oni ekvidas la sunon matene / *sunrise* / 일출

11. La ĉefo

“Sabate mia ĉefo vizitos la muzeon”, diras Eddie. “Li volas vidi, ke ĉio estas ĝusta kaj senproblema.”

“Nu bone, tio ne gravas.”

“Sed, komprenu Katrina, li ne ŝatos, ke iu alia homo loĝas en mia ĉambro. Tio estas la ĉambro de la muzeo, nur por la gvidisto.”

Katrina ridas. *Strangaj francoj*, ŝi pensas.

“Bone, mi faros promenon, dum li vizitos.”

“Jes, sed li eble restos longe. Ĉu ne estus bona okazo por vidi ion alian? Mi proponus al vi iri per la aŭto al *Le-Mont-Saint-Michel*, ĉe la norda marbordo. Vidu!”

Li montras foton pri alta roka insuleto, sur kiu troviĝas malnova preĝejo inter aro da domoj.

“Jen rigardu la mapon. Estas belega loko. Tre vidinda.”

Katrina studas la francan geografion, pripensas kaj diras:

“Nu, eble ĝi estas interesa, sed estos longe iri tien kaj reen en unu tago.”

“Jes, tio estos tro longa kaj laciga. Sed mi konas bonan hoteleton tie.”

Eddie montras sur la mapo.

“Ĝi estas tre simpatia”, li diras, “tamen simpla. Tre bretona domo. Kun bona bretona manĝo. Tie vi restos dumnokte kaj poste revenos ĉi tien.”

Eddie pravas. Ŝi devas rigardi ion alian en Francio. Ne nur ĉi tiujn keltajn ŝtonegojn. Do, sabate matene ŝi ekiras norden. Estas bela tago. La suno brilas. Ŝi povos viziti strandon kaj bani sin. Subite ŝi memoras, ke ŝia dukolora bikino restas en la muzea ĉambro. Ĉu ŝi devas aĉeti novan en iu urbo? Ne, pli facilas reiri por

preni ĝin. Ne estas tre malproksime. Katrina esperas, ke ŝi revenos antaŭ la ĉefo de Eddie. La ĉefo eble ne venos tre frue. Tiu stranga ĉefo, kiu alvenas sabate.

Sed Katrina ne pravas. La ĉefo venis frue. Aŭ eble Katrina malfruas. Kiam ŝi revenas al la muzeo, la ĉefo jam estas tie kun Eddie. La ĉefo de Eddie tamen ne rigardas la muzeon, sed iris kun Eddie en lian ĉambron. Kiam Katrina venas al la pordo de Eddie, ŝi aŭdas la voĉon de juna virino trans la pordo. Aŭdiĝas ankaŭ la voĉo de Eddie. Li parolas france, tamen lia voĉo tre molas. *Do, la lingvo ne ŝanĝis lian voĉon*, pensas Katrina. *Ne la lingvo, sed la sentoj ŝanĝas la voĉon*. Katrina volas koleri. Li trompis ŝin. Li ne diris la veron. Ŝi ne komprenas, kion ili diras trans tiu pordo. Tamen ŝi komprenas, pri kio temas. Temas pri amo. Kaj ŝi aŭdas, ke ili konas unu la alian delonge. Ŝi aŭdas, ke la malnova lito komencas soni malbele. Kaj ŝi aŭdas, ke ne indas iri en la ĉambron por repreni ion, kion ŝi lasis tie. Ĉio, kion Katrina lasis tie, nun ne plu estas ŝia. Ŝi volas krei, ŝi volas koleri, sed ŝi ne povas. Jes, ŝi koleras, sed nur al si mem. Ŝi volas frapi ion forte, sed... kion do frapi? Ĉu sin mem?

Katrina ne prenas sian bikinon. Ŝi ne iros al la maro. Kaj ŝi ne iros al la vidinda roka insulo. Ŝi foriras de la keltaj ŝtonegoj, la kelta gvidisto kaj lia ĉefino. Ŝi aŭtas al la plej proksima urbo kaj trovas hotelon kun trinkejo. Ŝi ne malsatas, tamen manĝas kaj trinkas ruĝan vinon. Ŝi manĝetas kaj trinkegas. La manĝo ne plaĉas al ŝi, sed la vino jes. La vino estas forta, sed ŝi iomete malfortigas ĝin per sia ploro. Post la unua glaso ŝi ploretas, post la tria ŝi ploregas. Sed post la kvina glaso da vino finiĝas ŝia plorado, kaj ŝi komencas ridi. Post la sesa glaso oni ne plu donas al ŝi vinon. Ŝi jam havas sufiĉe. Tio ne gravas. Ankaŭ tiam ŝi ridas. Katrina volas iri al la muzeo por prelegi al tiu kelta gvidisto kaj lia ĉefino. Ŝi

diros al ili kelkajn verojn. Sed tio ne eblas. Pro la vino ŝi ne povas aŭti. Sed tio ne gravas. Oni donas al ŝi ĉambron en la hotelo. Ne indas peti plian glason da vino. Ankaŭ tio ne gravas. Nenio plu gravas. Post nelonge Katrina dormas.

Glosoj:

bikino ^E	duparta ban-kostumo / <i>bikini</i> / 비키니
ĉefo ^B	homo, kiu regas / <i>head, boss</i> / (조직의) 수장
foto ^D	fotografia bildo / <i>photo</i> / 사진
frapi ^B	subite forte ektuŝi / <i>beat, strike</i> / (문을) 두드리다
insulo ^C	tero kun akvo ĉirkaŭe / <i>island</i> / 섬
koleri ^C	havi malbonan humoron / <i>be angry</i> / 화내다
mapo ^Ĉ	deseĝno de (parto de) lando / <i>map</i> / 지도
pravi ^B	diri la veron / <i>be right</i> / 옳다, 정당하다
preĝi ^Ĉ	paroli al dio / <i>pray</i> / 기도하다
preĝ-ejo ^Ĉ	domo por religiaj agoj, precipe kristanaj / <i>church</i> / 교회
trompi ^Ĉ	vole erarigi iun / <i>deceive, cheat</i> / 속이다

Le-Mont-Saint-Michel [*le monsanmiŝel*] 몽생미셸 (수도원)

12. Katrina foriras

Katrina vekigās en granda lito de franca hotelĉambro. Ŝi vekigās sola. La lito estas tro granda por sola svedino. Kaj la lito moviĝas. Ĝi rondiras en la ĉambro. Ne, eĉ la tuta ĉambro rondiras ĉirkaŭ ŝi. Katrina ne iris al la maro, tamen ŝi nun estas marmalsana.

Katrina trinkas kafon, multe da kafo, sed ŝi nenion manĝas. Ŝi iras al la eta aŭto, kiun ŝi luis antaŭ pli ol semajno. Ŝi iros preni sian bikinon kaj kelkajn aliajn aĵojn, kiujn ŝi lasis en la muzea ĉambro. Ŝi ne scias, ĉu la ĉefino restas. Ŝi eĉ ne volas scii tion. Tio ne gravas.

Kiam Katrina alvenas, la ĉefino ne restas. Eddie estas sola. Li ridetas, kiam li ekvidas Katrinan.

“Saluton, kara! Ĉu vi ĝuis la vojaĝon?”

Katrina volus koleri. Ŝi volus diri ion al Eddie, kio neniigus lin kaj ĉiujn liajn stultajn keltajn ŝtonegojn. Aŭ eĉ pli bone, ŝi volus havi magian povon, por neniigi lian ĉefinon kaj repreni lin kun la aliaj aĵoj, kiujn ŝi lasis ĉi tie. Sed ŝi ne havas tian povon. Ŝi ne estas druido.

Katrina ne povas koleri. Ŝi sentas, ke ŝi ploros. Ŝi ne volas plori. Por batali kontraŭ la ploro, ŝi sidiĝas sur la liton kaj saltetas. La lito malbele sonas. Eddie rigardas ŝin demande.

“Kio okazis, Katrina?” li demandas. “Ĉu io malbona?”

Katrina rigardas lin kaj decidas ne plori.

“Ĉu via ĉefo ŝatis vian liton? Ĉu ĉi tiu sono ne malplaĉis al ŝi? Ŝi estas tre juna, ĉu ne? Ŝi devas esti tre bona por iĝi ĉefo tiel juna. Ĉu ŝi trovis, ke vi bone laboras?”

Eddie rigardas ŝin silente. Ŝajnas, ke ŝi surprizas lin. Katrina ne scias, kion ŝi atendis. Eble ŝi atendis, ke li ploros pro honto kaj

petos pardonon. Sed Eddie ne ploras. Ŝajne li tute ne hontas. Li longe rigardas ŝin. Liaj okuloj ŝajnas malmolaj. Subite li rigardas ŝin malame. Kaj kiam li parolas, lia voĉo malmolas. Li parolas angle, sed lia angla lingvo ne plu molas.

“Foriru!” li diras. “Reiru al via Svedio! Neniam revenu! Kial vi venis ĉi tien? Kial vi restadis ĉi tie? Mi ne petis vin!”

Poste li eksilentas kaj rondiras tien-reen en la ĉambro. Fine li staras antaŭ ŝi.

“Paku viajn aĵojn kaj foriru! Mi ne plu volas vidi vin.”

Katrina rigardas lin. Li koleras. Ŝi volis koleri al li, sed ne povis. Tamen Eddie tion povas. *Strange*, ŝi pensas. *Kial koleras li? Mi ne trompis lin! Li trompis min! Mi estas tiu, kiu devas koleri! Ne li!*

Ŝi trovas nenion dirindan. Ŝi prenas siajn aĵojn kaj foriras.

Glosoj:

honti ^Chavi malagrablan senton pro faro de io malbona / *be ashamed* / 부끄러워하다

mar-mal-sanamalbone farti pro la moviĝado de la maro / *seasick* / 뱃멀미하는

neni-igi ^Atiel agi, ke io iĝas nenio / *obliterate, wipe out* / 없애다

paki ^Ckunmeti aĵojn por pli facile porti ilin / *pack* / (짐을) 꾸리다

rond-iri ^{BA}moviĝi en rondo / *rotate, go round* / 돌아가다

13. En Parizo

Katrina revenas al Parizo. Ŝi promenas al vidindaĵoj, ŝi vizitas la famajn muzeojn kaj preĝejojn, ŝi sidas en kafejoj. Ŝi rigardas homojn. Ĉie homoj duope promenas, rapidas, staras, sidas, interparolas, kunestas. Neniam ŝi vidas solan homon. Nur ŝi mem solas. Ŝajnas al ŝi, ke en Parizo oni devas esti duope.

Ŝi pensas pri Eddie. Ŝi ne volas pensi pri li, sed ne eblas ne pensi pri li. Ŝi koleras pri li. Sed ŝi ankaŭ revas pri li. Ŝi revas, ke li petas ŝin reveni. Tiam ŝi diras al li “ne”, kaj li devas petegi ŝin kaj diri, ke li neniam plu trompos ŝin.

Sed ŝi scias, ke tio estas nur stultaj revoj. *Kial mi ĉiam refaras la saman eraron?* ŝi demandas sin. *Kial mi renkontas nur virojn, kiuj havas alian virinon?*

Subite ŝi ekpensas pri sia patrino. Dum longa tempo ŝi ne pensis pri ŝi. Sed nun ŝi volus demandi, ĉu ankaŭ ŝia patrino faris la saman eraron. Ĉu ankaŭ ŝi renkontis viron, kiu havis alian virinon? Ĉu Katrina refaras la eraron de sia patrino? Ne eblas scii. Ne plu eblas demandi. Katrina malfruas demandi la patrinon.

Ĉie en Parizo Katrina aŭdas homojn paroli france. Ŝajnas al ŝi, ke ŝi aŭdas ne unu, sed kelkajn francajn lingvojn. La energian francan de la gvidisto Eddie. La molan francan de la trompulo Eddie. Kaj ŝi aŭdas rapidan francan, lacan francan kaj koleran francan. Sed troviĝas ankaŭ multaj vizitantoj en Parizo, kaj ŝi aŭdas multajn lingvojn ĉirkaŭ si. Iufoje ŝi eĉ aŭdas duopon paroli svede, dum ili promenas proksime al la kafeja tablo de Katrina. Oftege aŭdiĝas la angla. Kelkaj malsamaj anglaj lingvoj. Tamen ŝi neniam rekonas la molan anglan, en kiu parolis al ŝi Eddie dum promenoj, ĉe glaso da vino aŭ en la malnova lito.

Katrina ofte sidas en kafejoj. Ŝi trinkas kafon kaj rigardas la homojn. Vinon ŝi ne plu trinkas. Ĝi ne plu plaĉas al ŝi. Ŝi jam havis sufiĉe da vino. Iufoje iu juna viro komencas paroli kun ŝi. Eble li pensas, ke necesas esti duope. Sola juna svedino en Pariza kafejo devas ne esti sola. Tamen ŝi restas sola. Ŝi ne volas esti sola, sed nenio alia eblas. Ŝi povas nur rigardi la homojn kaj pensi, ke ĉio devus esti alia.

Gloso:

iu-foje ^A je iu fojo / *some time* / 어느 경우에

-ope ^Ĉ en grupo(j) de, kune, (du-ope = du -oj kune) / *at a time, together* / 집합으로, 무리로 (du-ope : 2 인조로)

re-fari ^A fari denove, duan fojon / *redo* / 다시 하다

re-koni ^A vidi kaj memori, ke oni jam konas / *recognize* /
알아채다, 인정하다

14. Post la somero

La somero finiĝis. Katrina revenis hejmen. En la lastaj tagoj de la libertempo ŝi ekskursas kun Pernilla kaj Mats. Tamen ne al hokeo. Finiĝis la somero, tamen ne komenciĝis la tempo por bataloj sur glacio. Ili iras ŝipe al urbeto sur insulo en la maro por bani sin tie. Ankaŭ ĉi tiu estas roka insulo. Tamen ĝi ne similas la rokon en Francio, al kiu Katrina neniam venis. Sur la sveda insulo la roko estas mola. Ne, kompreneble ĝi ne estas vere mola, sed ĝi ŝajnas mola. Antaŭ miloj da jaroj la granda glacio mole formis kaj rondigis ĝin. Katrina kaj ŝiaj amikoj saltas de roko en la maron. La mara akvo restas sufiĉe varma post la somero.

En alia tago Katrina iras sola al la tombo de sia patrino. Ŝi sidas tie dum longa tempo. Ŝi pensas pri la patrino. Kiam Katrina estis infano, ŝi pensis, ke la patrino restos por ĉiam. Poste ŝi komprenis, ke neniuj restos por ĉiam. Sed ŝi neniam pensis, ke la patrino restos tiel mallonge.

Kiam ŝi reiras, ŝi vidas aliajn homojn, kiuj vizitas la tombejon. Ili ĉiuj estas maljunaj. Nur Katrina estas juna. *Eble tombejo estas loko por maljunaj homoj*, ŝi pensas. Sed ŝia patrino ne estis maljuna. Ŝi estis tro juna por kuŝi en tombo. Katrina pensas, ke ne eblas kompreni la vivon.

Post kelkaj tagoj ŝi rekomencas labori. La infanoj de ŝia klaso nun komencas novan jaron de lernado en la lernejo. Ili nun estas en la kvina klaso. Kelkaj el ili kreskis dum la somero. Aliaj estas tute samaj, kiel antaŭe. Du knabinoj ekhavis la unuajn formojn de virino. Unu knabo jam estas pli alta ol Katrina.

Ankaŭ nun la laboro estas tre laciga. Tamen Katrina jam estas pli trankvila. Ŝi konas sian laboron. Ŝi estas instruisto jam de

kelkaj jaroj. Kaj ŝi konas la infanojn. Dumsomere ili ne iĝis pli lernemaj, legemaj aŭ silentemaj. Sed tio ne gravas. Ili tamen plaĉas al ŝi. Ofte ŝi koleras, kaj kelkfoje ŝi krias al ili. Sed poste ŝi preskaŭ ĉiam ridas. Kion fari? Ili ofte estas stultuloj, ili faras la plej stultajn erarojn. Sed kiu neniam faras stultan eraron?

Sabate, post la labor-tagoj, nun restas al ŝi iom da energio. Ŝi refoje renkontas siajn geamikojn. Kelkfoje Peter estas kun ili. Ankaŭ nun li ne tre plaĉas al ŝi. Sed ne gravas. Tamen oni povas iom interparoli.

Gloso:

tombo Ĉkavo, kie oni enterigis homon / *grave* / 무덤

15. Katrina atendas

Katrina atendas. Jam de kelka tempo ŝi atendas. Ŝi atendas ion, kio kutime venas ĉiumonate. Unue, ŝi ne estas maltrankvila. Estis multe da ŝanĝoj lastatempe. Ŝi vojaĝis. Ŝi revenis. Ŝi havis libertempon. Poste ŝi eklaboris. Kelkfoje ŝi devas atendi kelkajn tagojn. Tamen nun ŝi jam atendis dek du tagojn. Tio estas tro longa tempo.

Ŝi rigardas en sia eta kalendaro. Ŝi kutime notas en ĝi kelkajn tagojn. En ĉiu monato ŝi skribas ‘A’ ĉe la tago, kiam ŝi atendas la monataĵon. Poste ŝi skribas ‘M’, kiam ĝi venas. Kaj fine ŝi skribas ‘O’ en tago inter la ‘M’ kaj la sekva ‘A’. Tiu tago estas la plej danĝera. Katrina tre zorgas pri sia kalendaro. Ŝi tre zorgas pri sia vivo. Ŝi estas virino zorgema.

Sed ĉi-somere ŝi zorgis pri alio. Post la lasta ‘M’ ŝi forgesis skribi la kutiman ‘O’. Kaj mankas ankaŭ la sekva ‘A’.

Katrina pensas pri tiuj tagoj. Nun ŝi memoras. Tiam ŝi zorgis pri alio. Ŝi forgesis rigardi en sia kalendaro. Ŝi promenis en la granda kelta kalendaro el ŝtonegoj. Ŝajnas al ŝi, ke mankis unu ŝtono en tiu kalendaro. Mankis tiu ŝtonego, kiu rakontus al ŝi, kiu tago plej danĝeras. Eble tamen tiuj druido ne pensis pri ĉio.

Fine ŝi devas fari teston. Kaj ĝi estas tute klara. Ne plu indas atendi la monataĵon. Ĝi ne venos. Necesas komenci alian atendadon. Katrina havos infanon.

Ĉu vere? Eble, eble ne. Ŝi ne scias, kion fari pri ‘ĝi’. Ĉu ne estus eraro, erarego, se ŝi havus infanon? Refoje ŝi refarus la eraron de sia patrino. Tiu infano ne havus patron. Kaj kiel Katrina povus zorgi pri infaneto? Ŝi jam zorgas pri tuta klaso da infanegoj! Ŝi jam nun estas laca. Ŝi eble estus malbonega patrino.

Tamen, ĉu ŝia patrino estis malbona? Ne! Eble ŝi ne estis bonega. Ne facilas esti bonega, kiam oni estas sola. Ŝi estis sufiĉe bona. Eĉ pli ol sufiĉe.

Katrina pripensas. Kion decidi? Ĉu jes aŭ ne? Kion fari pri ‘ĝi’? Sed ĉiufoje, kiam ŝi pensas pri tiu ‘ĝi’, ĝi pli kaj pli similas infanon. Ŝi komencas pensi, ke ĝi eble estos knabino. Aŭ ĉu knabo? Eble ĝi similos... Ne, pri tio ŝi ne volas pensi. Tamen la pensoj alvenas. Kontraŭ ŝia volo.

Fine ŝi jam pensis tro multe kaj tro longe. Ne plu eblas demandi, ĉu jes aŭ ne. Ne plu gravas, ke ĝi lacigos ŝin pli ol ĉiuj infanegoj de la klaso. Katrina havos infaneton. Katrina estos patrino.

Glosoj:

noti Ĉskribi por memori, enmemorigi / *note* / 노트하다,
기록하다

testo ^Esistema, scienca provo ekscii aŭ pruvi ion / *test* / 시험, 검사

16. Problemoj pri patroj

En suda Svedio la aŭtuno estas tre longa. Ĝi komenciĝas per belaj aŭtunaj koloroj de la arboj. Poste ĝi iĝas griza, pli kaj pli malhela. Dum la tuta aŭtuno Katrina pensas, ke ŝi devus skribi leteron al Eddie. Ŝi devus rakonti al li, ke li estos patro. Sed ŝi nur pensas. Ŝi ne skribas. Vere, ŝi ne havas lian hejmurban adreson, nur tiun de la muzeo. Tamen ŝi ne skribas. Ŝi pensas, ke li eble tute ne ĝojos esti patro. Kaj eble lia ĉefino eĉ malpli ĝojos.

Dum la samaj aŭtunaj tagoj, Katrina pensas ankaŭ pri alia patro. Ŝi pensas pri sia propra patro. Ŝi eĉ ne scias, ĉu li vivas. Kiel ŝi eksciis, kiu li estas? Tio ŝajnas neebbla. Nur ŝia patrino sciis tion, kaj nun la patrino ne plu povas rakonti.

Ŝi havas kelkajn aĵojn, kiujn postlasis ŝia patrino. Inter tiuj aĵoj ŝi trovas foton de la patrino kaj viro, kiun ŝi ne konas. La patrino tie estas tre juna. Ŝi ŝajnas feliĉa. Ŝi ridas. Ankaŭ la viro estas sufiĉe juna, tamen ne same juna. Li estas pli serioza. Sur la foto ili sidas apud lago en arbaro. La patrino de Katrina havis helajn harojn. La haroj de Katrina estas sufiĉe malhelaj. Ankaŭ la viro de la foto havas malhelajn harojn. Estas neniu skribaĵo sur la foto, sed Katrina pensas, ke la viro eble estas ŝia patro.

Iutage ŝi ekhavas ideon. Antaŭ dudek ses jaroj ŝia patrino studis muzikon en iu lernejo. Katrina konas la nomon de tiu lernejo, sed ŝi ne scias, kie ĝi troviĝas. Nun ŝi serĉas ĝin per Interreto. Ŝi trovas multe da informoj. En la lernejo oni ankaŭ nun instruas muzikon. Ĝi troviĝas en la kamparo, sufiĉe longe for de Gotenburgo.

En la mezo de decembro komenciĝas ferioj en la lernejo de Katrina. Tiam ŝi telefonas al la muzika lernejo. Ankaŭ tie estas

ferioj, sed ŝi parolas kun iu viro, kiu zorgas pri la komputiloj de la lernejo.

“Mi ŝatus scii, ĉu eblas trovi la nomon de instruisto”, demandas Katrina.

“Kompreneble. Kion li instruas?” demandas la viro. “Muzikon, mi pensas. Sed... eble ne plu. Temas pri iu, kiu instruis tie antaŭ dudek ses jaroj”, klarigas Katrina.

“Dudek ses jaroj! Tiam ne estis komputiloj!”

“Sed eble restas iuj paperoj...?”

“Eble. Sed kiel trovi ilin? Por kio vi bezonas tion?” demandas la viro.

Katrina ne scias, kion diri.

“Mi ne povas klarigi. Sed tio gravas”, ŝi diras.

“Nu, mi pensas, ke ne facilas. Sed mi havas alian ideon. Nia bibliotekistino Gunnel Holm estas tre... nu, ŝi laboras ĉi tie de tre longe. Tridek jarojn, mi pensas. Vi parolu kun ŝi. Sed ŝi estas libera dum la ferioj. Kuŝas sur iu suda strando, mi pensas. Revenu post la ferioj, mi petas.”

Katrina dankas lin pro la propono, sed ĉu ĝi vere dankindas? Ŝi ne havas grandan esperon.

Glosoj:

biblioteko ^Ĉlibraro / *library* / 도서관

decembro ^Ĉla lasta monato de la jaro / *December* / 12 월

ferio ^Ĉlibera tago / *holiday* / 휴일

griza ^Ĉkoloro inter blanka kaj nigra / *grey* / 회색의

Inter-reto ^Dtutmonda reta interligaro de komputiloj / *Internet* / 인터넷

kamp-aro ^Bmal-urbo / *countryside* / 시골, 농촌

komput-ilo ^Delektronika aparato por ĉiaspeca laboro / *computer* /
컴퓨터

post-lasi ^Bne kunporti / *leave behind* / 남겨두다

reto ^Daro da interligoj; aro da interkrucaj fadenoj / *net* /
망(網), 그물

serioza ^Cne ridema, ne ŝercema; ne ridinda / *serious* / 심각한

17. Unu el

Nur post la festo de Novjaro Katrina povas renkonti la bibliotekistinon. Ŝi aŭtas al la muzika lernejo. Estas malvarma kaj griza tago, sed neĝo heligas la kampojn kaj kuŝas ankaŭ sur la arboj. Tamen la vojo estas sennegha. La lernejo ŝajnas malnova. Aro da ruĝaj domoj staras sur blanka kampo. Proksime ŝi vidas lagon, sur kiu kuŝas glacio kaj neĝo. Trans la lago estas arbaro. Ĉio estas trankvila.

Katrina trovas la bibliotekon kaj eniras. Kelkaj gejunuloj sidas sur sofo. Ili interparolas kaj preskaŭ ne rigardas Katrinan. Ĉe tablo en apuda ĉambreto ŝi vidas virinon, eble sesdek-jaran. Katrina demandas:

“Pardonu, ĉu vi estas Gunnel Holm?”

La virino jesas kaj salutas Katrinan. Katrina diras sian nomon kaj klarigas, ke ŝi volas demandi pri iama instruisto.

“Bone. Pri kiu temas?” demandas Gunnel Holm.

“Li estis instruisto pri muziko antaŭ dudek ses jaroj”, diras Katrina. Ŝi elpoŝigas la foton kaj montras ĝin. “Mi ne scias certe, sed eble tiu viro estas li.”

La bibliotekistino ŝanĝas okulvitrojn kaj studas la foton. Poste ŝi faras strangan rideton kaj jesas.

“Kompreneble. Jen li kun unu el siaj etaj amikinoj.”

Unu el, pensas Katrina. Ŝi tute ne ŝatas tiujn vortojn. Ŝi jam scias tro bone, kion tio signifas, esti *unu el*. Al ŝi multe pli plaĉus la vorteto *la*.

“Kiel li nomiĝas?” ŝi demandas.

La bibliotekistino rigardas ŝin super la okulvitroj, poste ŝi rigardas la foton, kaj fine refoje Katrinan.

“Vi demandas, kiel li nomiĝas? Ĉu vi vere ne scias lian nomon?” diras la virino.

“Ne”, diras Katrina kaj atendas silente.

“Strange”, diras Gunnel Holm. “Ŝajnis al mi, ke vi... Nu, bone, tiu viro estas Leo Levin. Tre bona pianisto. Ankaŭ sufiĉe bona instruisto. Sed li laboris ĉe ni nur... eble kvin jarojn.”

“Ĉu vi scias, kie li nun estas?” demandas Katrina.

“Ne, tute ne. Li foriris subite. Sekvis alia instruisto pri piano. Ili kutime foriras post kelka tempo, kaj sekvas aliaj. Ĉi tie ili ne restas longe. Estas tro malproksime de ĉio.”

Refoje ŝi faras la strangan rideton, kiu ne ŝajnas tre ĝoja.

“Kaj”, ŝi aldonas, “mi rekonas ankaŭ la knabinon de la foto. Sed ŝian nomon mi... nu, eble Marina aŭ io simila.”

“Vi preskaŭ pravas. Ŝia nomo estis Martina”, diras Katrina.

Gunnel Holm rigardas ŝin silente. Ne eblas scii, ĉu ŝi komprenas aŭ ne.

“Vi povus serĉi ĉe aliaj muzik-lernejoj. Aŭ en telefonlibro. Sed li povus esti ĉie en la mondo.”

“Ĉu li estis... ĉu li estas svedo?” demandas Katrina.

“Jes, certe! Nu, tio estas, pli-malpli... Eble lia familio venis de alilande. Sed li parolas kiel svedo. Kiel stokholmano, se mi ĝuste memoras. Sed tio nenion signifas, nuntempe. Homoj ne emas resti. Ili iras tien-reen, de loko al loko. Neniu restas...”

La bibliotekistino subite ŝajnas laciĝi. Ŝi faras mienon de enuo. Katrina dankas ŝin kaj foriras. *Leo Levin, bona pianisto*, ŝi pensas. *Ĉu li estas mia patro?* Ne eblas scii certe, tamen ŝi jam certas.

Glosoj:

mieno Ĉesprimo de la vizaĝo / look, expression / 표정

Nov-jaro ^A.....la unua tago de januaro / *New Year* / 신년, 새해
 okul-vitro-j ^{BC}.....ilo por pli klare vidi / *glasses* / 안경
 piano ^Emuzikilo kun kordoj, kiujn oni frapas per klavoj /
 piano / 피아노
 vitro ^C.....malmola travidebla materialo / *glass* / 유리

18. Vizito en Stokholmo

Kiam Katrina revenas hejmen, ŝi denove serĉas en Interreto. Tuj ŝi trovas informojn pri iu Leo Levin, historiisto en Novjorko. Strange, ŝi pensas kaj legas plu. Tiam ŝi trovas, ke la fama historiisto Levin mortis en 1967. Ne la ĝusta persono, do. Fine ŝi trovas informon pri la Sveda Muzika Altlernejo en Stokholmo. Inter multaj aliaj nomoj de instruistoj ŝi trovas ankaŭ la nomon Leo Levin. Tiu devas esti la ĝusta. Do... do kio? Ĉu vojaĝi tien, eniri dum lia instru-horo kaj diri “Saluton, patro”?

Katrina devas pripensi, kion fari. Ŝi ne povas rapide decidi.

Post kelkaj tagoj ŝi sentas ion strangan en la ventro. Io moviĝas tie! Ŝajnas al ŝi, ke fiŝo moviĝas tien-reen en ŝia ventro. Subite ŝi sentas, ke la infano vere estas tie. Vera infano! Ŝi komprenas kaj tamen ne komprenas. Iu vivas en ŝi. Iu, kiun ŝi ne konas, ekloĝis en tre malgranda loĝejo en ŝia ventro.

Sed ŝia ventro ne plu estas tre malgranda. Post Novjaro, kiam la ferioj finiĝas, kelkaj aliaj instruistoj en ŝia lernejo rigardas ŝian ventron. Neniu tamen diras ion. Ĉu ŝi devas mem rakonti? Kaj kion pri la infanoj de la klaso? Ili ĝis nun nenion vidis, sed finfine ankaŭ ili vidos. Ĝis nun ŝi rakontis nur al Pernilla kaj Mats. Kiam estos la ĝusta tempo por informi la mondon? Kiam ŝi rakontu al Eddie? Kaj al... al sia patro?

La tagoj pasas. Post monato ŝi denove havas feriojn. Ŝi skribas mallongan leteron al Eddie, kie ŝi rakontas pri la infano, kiun ŝi atendas. Kaj ŝi ekiras per vagonaro al Stokholmo. Kiam ŝi alvenas, ŝi serĉas en telefonlibro por trovi la adreson de la muzika altlernejo. Poste ŝi serĉas ĉe *Levin*, kaj tuj trovas lin. *Levin, Leo k. Tina*. Ŝi notas la adreson kaj telefonnumeron de lia hejmo.

Estas tagmezo, kaj ŝi unue manĝas en restoracio. Ŝi sentas, ke ŝi vere bezonus glason da vino. Tamen, kiam ŝi sentas etan moviĝon en la ventro, ŝi memoras. Eble ŝi bezonas vinon, sed la infano ne. Akvo bedaŭrinde ne estas tre trankviliga. Sed nenio fareblas. Ŝi iras al la altlernejo. Ŝi devus telefoni unue, sed ŝi ne povas. Ŝi scias, ke estas stulte alveni tiel, kiam oni ne atendas ŝin. Eble li ne estos tie. Aŭ ŝi ne povos renkonti lin.

Sed ĉio okazas rapide. Ŝi alvenas kaj eniras. Kiam ŝi petas viziti lin, oni nenion demandas, sed montras al ŝi ĉambron. Ŝi rigardas la nomon *Leo Levin* kaj frapetas al la pordo.

“Envenu!”

Ŝi eniras. Tie ĉe tablo sidas viro eble kvindek-jara. Kun haroj malhelaj, iomete grizaj. Li havas sufiĉe grandan ventron. Pli grandan ol la ventro de Katrina.

“Bonan tagon. Mi estas Katrina Månsson.”

“Saluton. Kion mi povas fari por vi?” li diras amike.

Ŝi elpoŝigas la foton. Li ne tre similas la viron sur la foto. Tamen iomete, se oni rigardas zorge.

“Tio estas vi, ĉu ne?” ŝi diras.

Li rigardas dufoje. Poste li diras, ne plu same amike:

“Jes, certe. Kial?”

Katrina silentas. Ĉu li ne komprenas? Ŝi montras la foton refoje:

“La virino... Ŝi estis Martina Månsson...”

Nun lia mieno ŝajnas preskaŭ malamika.

“Kaj do...?” li diras, malmole.

“Ŝi... ŝi estis mia patrino. Ŝi mortis antaŭ dek monatoj”, diras Katrina.

Leo Levin ekstaras. Nun li ne plu ŝajnas malamika, sed timema.

“Kara sinjorino, mi tre bedaŭras. Sed kion mi faru pri tio? Mi ne konas vin aŭ vian patrinon. Bonvolu kompreni, ke mi havas multon por fari...” Li malrapide iras antaŭen kaj montras al Katrina la pordon. Dume, li ne rigardas en ŝiajn okulojn.

Li komprenis, pensas Katrina. *Li komprenis, sed li ne volas kompreni. Li timas min.*

Ŝi faras unu paŝon al li. Li paŝas malantaŭen. Ŝi levas la foton kaj diras:

“Tiun foton vi farigis antaŭ dudek ses jaroj.” Tion ŝi ne vere scias, sed ne gravas. Ŝi pluas: “Mi nun estas dudekkvin-jara.”

Neniu el ili diras ion. Neniu moviĝas. Poste la patro de Katrina iras al la pordo kaj malfermas ĝin. Li ne rigardas ŝin, kiam li diras:

“Mi bedaŭras, sed mi ne plu havas tempon. Mi ne povas fari ion por vi, sinjorino.”

Glosoj:

el-poŝ-igi ^C preni el la poŝo / *take out of one's pocket* /

주머니에서 꺼내다

far-igi ^A igi, kaŭzi, zorgi, ke oni faru / *make someone do* /

~에게 ~를 하게하다

Novjorko ^E La plej granda urbo de Norda Ameriko (*New York*) /

뉴욕

plu-i ^A plu esti, plu agi, plu paroli / *continue, go on* /

~을 계속하다

ventro ^D parto de la korpo, kiu enhavas la stomakon kaj intestojn / *belly*

/ 배(腹)

19. Neniu respondoj

Katrina ne ŝatas pensi pri sia vizito en Stokholmo. Ŝi ne scias, kion ŝi atendis. Tamen ŝi ne atendis tian respondon, kiel tiun de la grizeta kvindek-jara fremdulo, kiu certe estas ŝia patro. *Tre bona pianisto*, ŝi pensas. *Sufiĉe bona instruisto*. *Sed tre malbona patro*.

Li ŝajnis timema. Sed kion li timis? Ĉu li timis Katrinan? Ĉu li pensis, ke ŝi petos monon de li? Tamen ŝi estas plenkreska virino. Ŝi laboras. Ŝi ne bezonas lian monon. Eble ŝia patrino iam bezonis ĝin. Eble li eĉ pagis al ŝi. Katrina scias nenion pri tio.

Poste ŝi ekpensas, ke li eble timas sian edzinon. Ĉu ili havas infanojn? Ĉu Katrina havas gefratojn? Ŝi rigardas la noton kun lia hejma telefonnumero. Sed ŝi ne telefonas.

Ŝi tamen iutage rakontas al la aliaj instruistoj en la lernejo, ke ŝi havos infanon. Unu el ili, kvindek-jara virino, ridas:

“Kara Katrina, ĉu vi pensas, ke ni ne havas okulojn?”

Katrina rigardas sian ventron. Vere, ĝi iom elstaras. La alia instruistino ludas etan teatraĵon. Ŝi paŝas malrapide kiel Katrina, poste ŝi peze sidiĝas kaj metas la manojn sur la ventron. Ĉiuj ridas.

“Aĉ! Vi troigas!” diras Katrina kaj ruĝiĝas. “Bonvolu ne moki min!”

Ŝi rakontas ankaŭ al la infanoj de la klaso. Tiam ŝi vere surpriziĝas.

“Ni jam scias!” diras knabino. “Oni vidas tion bonege!”

Ĉu tiuj infanoj vere povis vidi tion, kaj tamen nenion diris? Strange. Eble ili aŭdis instruistojn aŭ gepatrojn paroli pri ŝi. Poste ŝi pensas pri tio, ke tiu knabino havas etan fraton. Eble ŝi memoras, kiam la ventro de patrino malrapide kreskis, dum la tuta familio malpacience atendis la novan infaneton.

Katrina sufiĉe ofte vizitas siajn geamikojn Pernilla kaj Mats. Kun ili ŝi parolas pri Eddie kaj pri sia patro. Iufoje ankaŭ Peter estas tie. Kiam li ekscias pri ŝia vizito en Stokholmo, li diras:

“Ĉu vi volas scii, ĉu vi havas gefratojn?”

“Jes, sed kiel? Mi ne volas telefoni al ili.”

“Ne necesas”, diras Peter. “Mi serĉos.”

Post du tagoj li telefonas al ŝi:

“Vi havas dekses-jaran fraton. Kaj dektri-jaran fratinon. Ili nomiĝas Fredrik kaj Karin.”

“Kiel vi povas scii?” ŝi ekkrias. Ŝi neniam prenis lian proponon serioze.

“Registro de loĝantoj. Ĉiuj povas informiĝi. Neniu problemoj.”

La geamikoj ankaŭ proponas, ke ŝi sendu leteron al la patro. Kiam ŝi renkontis lin, ŝi ne donis al li sian adreson. Do, li ne povas kontakti ŝin, se li volas.

“Se vi vidus tiun viraĉon, vi komprenus, ke li ne volas”, diras Katrina.

“Tamen li eble volos. Eble li nur bezonas iom da tempo”, diras Pernilla.

“Iom da tempo? Jam pasis dudek ses jaroj...”

Tamen ŝi sendas sian adreson al Leo Levin. Sed respondo ne venas. Ankaŭ el Francio nenio venas. Ŝajnas, ke la patroj en la vivo de Katrina ne estas tre patremaj. Certe ili ne tre kontaktemas.

Glosoj:

el-stari ^A esti pli granda ol la ĉirkaŭaĵo / *stand out* /

돌출하다, 뛰어나다

kontakto ^D interrilato / *contact* / 접촉

patr-ema ^B tia, ke oni volas agi kiel patro / *fatherly* / 아버지 다운,

plen-kreska ^{AB}.....ne plu infano / *grown-up* / 성인의

registro ^Esistema aro da notoj, informoj / *register, record* / 등록

20. Katrina fruas kaj malfruas

Tagoj pasas. Pasas eĉ monatoj. La vintro jam finiĝis, kaj la tagoj iĝas pli longaj. Tamen restas longa tempo ĝis la somero. Estas sabato. Katrina ripozas post kvin labortagoj. La laboro nun estas peza, kaj Katrina estas peza. La infanoj restas same nelernemaj kiel kutime, sed tio ne gravas. Katrina estas laca, sed ankaŭ tio ne gravas. Ne venis respondoj al ŝiaj leteroj, kaj tio iom gravas. Se ŝi ne estus tiel laca, tio eĉ kolerigus ŝin.

Sonas la telefono. *Eble Pernilla*, ŝi pensas. Ŝi respondas kaj aŭdas virinan voĉon, kiun ŝi ne konas:

“Saluton! Parolas Tina Levin en Stokholmo.”

La edzino! Katrina tuj ekpensas pri la franca voĉo de la bretona ĉefino. Kial tiuj aliaj virinaĉoj ĉiam malhelpas al ŝi?

“Halo! Ĉu vi estas tie?”

“Jes, jes”, diras Katrina lace.

“Mi estas la edzino de Leo. Ĉu mi bone komprenis, ke vi estas lia filino?”

La voĉo de tiu edzino ne sonas tre malamike. Kion ŝi volas? Ĉu tiu timema aĉulo ne povas mem telefoni, sed bezonas helpon?

“Jes, mi estas... mi estas lia filino.”

“Nu, Leo rakontis al mi, aŭ pli ĝuste – mi ekvidis vian leteron kaj pridemandis lin. Do... via patrino studis en lia lernejo, ĉu ne?”

“Jes...” respondas Katrina kaj plu atendas, kio sekvos.

“Mi komprenas. Nu, ni ŝatus renkonti vin, se tio eblas. Ĉu vi ŝatus veni viziti nin?”

Katrina malrapidege komencas kompreni. Tiu fremdulino eble ne estas ŝia malamiko. Ŝi eble eĉ estas preskaŭ normala homo.

“Vere Leo devus telefoni al vi por peti pardonon. Sed li ŝajne hontas. Vi komprenas, ĉu ne..? Viroj...” La voĉo de Tina finiĝas en eta rido. Sed ĝi revenas: “Li sciis nenion pri vi. Nu, tiel li diras. Mi ne scias, ĉu kredi tion... Halo, ĉu vi restas?”

Katrina diras, ke ŝi restas, kaj la energia Tina pluas:

“Kion vi pensas? Ĉu plaĉus al vi veni en la sekva sabato? Vi povos resti ĝis dimanĉe, kompreneble. Nu, eĉ pli longe, sed vi eble laboras..?”

“Jes, jes. Mi estas instruisto...” informas Katrino.

“Do, same kiel Leo! Ĉu ankaŭ de muziko?” “Nu, ne nur... De... de ĉio...”

“Ankaŭ nia filino tre scivolas pri vi...” pluas Tina. “Nu, la tuta familio, kompreneble.”

Fine Katrino retrovas forton por diri:

“Bone, mi venos viziti vin. Sabate do.”

“Bonege, vi estos tre bonvena, Katrino! Bonvolu pardoni Leon!”

Dum la sekva semajno Katrino kelkfoje pensas pri la vizito, kiun ŝi faros. Ŝi tute ne scias, kion pensi pri la stranga interparolo. Kia estas tiu virino? Kaj kia estas Leo, ŝia patro? Nu, ŝi ekscias tion post kelkaj tagoj. La vizito ne povos esti pli stranga ol ŝia antaŭa vizito en Stokholmo.

Tamen Katrino malfruos al tiu dua Stokholma vizito. Vendrede vespere, kiam ŝi pakas siajn aĵojn por la vojaĝo, ŝi eksentas ion novan en la ventro. Granda forta mano ekprenas ŝian ventron dolorige. Poste ĝi lasas ŝin. Ĉu eblas? Ĉu jam, dudek tagojn tro frue?

Jes. Ĝi revenas. Katrino telefonas al malsanulejo, sed oni trankviligas ŝin. Ŝi atendu. Ne estas tempo. Ŝi atendu ĝis la doloroj venos pli ofte.

Estas longa nokto por Katrina. Pernilla venas al ŝi por akompani sian amikinon. Kaj frue matene ili iras – ne per vagonaro al Stokholmo, sed per aŭto al la malsanulejo.

Katrina timas, sed oni diras kaj rediras al ŝi, ke ĉio estas normala. Nu, iom tro frua, sed tio ne estas danĝera. Ĉio certe okazos bone.

Post nelonge la doloroj plioftiĝas kaj plifortiĝas. Katrina estis laca jam hieraŭ vespere. Nun ŝi estas tiel lacega, ke ŝi preskaŭ ne scias, kie ŝi estas. La doloroj venadas kiel ondo post ondo, kaj ŝi ne povas ripozi. Fine, iom post la tagmezo, ŝia infano venas en la mondon. Oni montras ĝin al ŝi, diras “vidu, estas knabo”, kaj dum kelka tempo kuŝigas lin sur ŝin. Katrina metas la manon ĉirkaŭ sian filon. Liaj okuloj estas tre klaraj, kaj li faras etajn sonojn. Ĉio ŝajnas tute malkredinda. Poste la knabeto devas kuŝi pli varme. Li estas malgranda, tamen sana. Fine Katrina povas dormi.

Vespere Katrina telefonas al Stokholmo. Ŝi kuŝas sur la lito kaj aŭdas viran voĉon en la telefono.

“Ĉe Levin”, diras Leo Levin, ŝia patro.

“Saluton... Jen Katrina”, ŝi diras malrapide. “Mi... mi malfruis al vi, ĉar... ĉar mia filo Martin tro fruis.”

Gloso:

halo! ^E alvoko, ekzemple en telefono / *hallo!*, *hullo!* / 여보세요

Teknika postklarigo por instruantoj

La rakonto *Katrina malfruas* celas prezenti facilan legaĵon al personoj, kiuj lernis la bazan Esperantan gramatikon kaj la plej bazan vortaron. Ĝi ne estas lernolibro, sed rakonto kun la intenco distri. La lingvaĵo en dudek tre mallongaj ĉapitroj prezentas progresan defion al la leganto – alivorte: la unuaj ĉapitroj estas plej facilaj, la lastaj malplej. Ĉiuj ĉapitroj tamen uzas ĉefe simplajn, oftajn vortojn, facilajn gramatikajn formojn kaj frazojn kun simpla strukturo. La lingvaĵo konsistas el la praktike uzata, parolata, hodiaŭ vivanta Esperanto.

Ĉi tio estas la tria eldono de *Katrina malfruas*. Aperis ankaŭ la rakontoj *La krimo de Katrina*, kaj *Vojaĝo kun Katrina*, kun simila enhavo kaj identa ĉefrolulino. Ĉiuj tri tamen estas sendependaj rakontoj.

En ĉi tiu verko aperas morfemoj laŭ la suba tabelo:

Grupo	A	B	C	Ĉ	D	E	F	Entute	Vortoj
Nombro:	186	147	56	38	17	19	1	464	8 478

Post ĉiu ĉapitro mi glosis ĉiujn (nove) uzitajn vortojn el grupoj Ĉ-F, kaj ofte ankaŭ kelkajn aliajn.

La libreto do enhavas 464 diversajn morfemojn, el kiuj 389 estas inter la 724 plej oftaj morfemoj de Esperanto.

Sten Johansson

Verkoj de la aŭtoro

Originalaj:

Denaska kongresano (novelaro, 1992)

Ĝis revido, krokodilido! (novelaro, 1996)

Interkona mateno (teatraĵoj, 1996)

Mistero ĉe Nigra Lago (romaneto por infanoj, 1997)

Falĉita kiel fojno (krimromano, 1997)

Trans maro kaj morto (krimromano, 1999)

Neĝo kaŝas nur... (krimromano, 2001)

La krimo de Katrina (facila rakonto, 2001)

Dis! (romano, 2001)

Kion ajn (facila rakonto, 2002)

Vojaĝo kun Katrina (facila rakonto, 2002)

Memor' mortiga (krimromano, 2003)

Katrina malfruas (facila rakonto, 2004)

Pasteĉo (25 beletraj stilpastiĉoj, 2005)

Amaro (novelaro, 2005)

Kroze – proze (literatura esearo 2013)

Marina (romano 2013)

Skabio (romano 2015)

Kiam la vento turniĝos (bit-libra novelaro 2015)

El ombro de l' tempo (romano 2017)

Marina ĉe la limo (romano 2018)

Ne eblas aplaŭdi unumane (romano 2019)

Sesdek ok (romano 2020)

Secesio (romano 2021)

Falaflo en maco (romano 2023)

La nepo de Marina (romano 2023)

Tradukitaj:

Hjalmar Söderberg: La kiso (novelaro, 1995)

Pär Lagerkvist, Eyvind Johnson, Harry Martinson: Nobela novelaro (1995)

Torgny Lindgren: La beleco de Merab (novelaro, 1995)

En la realo troviĝas truo (nuntempa sveda novelarto, 1996) Torgny

Lindgren: La vojo de serpento sur roko (romano, 1997) Benjamin

Jacobsen: Inter tero kaj ĉielo (facil-legaj noveloj, 1997) Carl Jonas

Love Almqvist: Tio konvenas! (romaneto, 1998) Hjalmar Söderberg:

Doktoro Glas (romano, 1998)

Hjalmar Söderberg: La peltó (novelaro, 1999) August

Strindberg: Songódramo (dramo 1999)

Selma Lagerlöf: La mirinda vojaĝo de Nils Holgersson (2002) August

Strindberg: Insulanoj de Hemsö (romano, 2005)

Hjalmar Söderberg: La serioza ludo (romano 2016)

Frans G. Bengtsson: Orm la ruĝa, volumo 2. Hejme kaj en Oriento

(romano 2019)

Tove Jansson: Kometo en Muminvalo (infanlibro 2022)

Tove Jansson: Ĉapelo de sorĉisto (infanlibro 2023)

Tove Jansson: Memoroj de Muminpatro (infanlibro 2023)

Katrina Malfruas

문화원 : www.esperanto.kr

문화원 서점 : www.esperanto.name

메일 : leejungkee@khu.ac.kr

정가 : 5000원

Rakontoj pri Katrina

Katrina estas juna instruistino en Svedio, kaj tri rakontoj pri ŝi en facila Esperanto konvenas por tiu, kiu scias la plej bazan vortaron kaj gramatikon. La tuta rakonto estas verkita en facila lingvaĵo, sed plej facila ĝi estas en la komencaj ĉapitroj. Post ĉiu ĉapitro sekvas klarigoj de malpli facilaj vortoj.

La libreto ne estas lernolibro, sed prezentas facilan legaĵon por ĉiu, kiu volas uzi siajn akiritajn sciojn de Esperanto por legi distran rakonton.

La krimo de Katrina - unua rakonto -

temas pri vojaĝo de Katrina al Berlino por serĉi sian amon de la antaŭa jaro, sed ne facilas trovi ĝin sen fari krimon!

Vojaĝo kun Katrina - dua rakonto -

temas pri Katrina kaj ŝiaj lernantoj, pri vojaĝo de Gotenburgo al Bjalistoko, pri serĉado kaj sopiroj. Sed unue kaj laste ĝi temas pri *amikeco* inter junaj homoj.

Katrina malfruas - tria rakonto -

temas pri la klopodoj de Katrina formi sian vivon kun amo, laboro kaj familiaj rilatoj. Kial ŝi ĉiam ripetas la eraron de sia patrino? Kaj kial la patroj emas malaperi?